

Vi lernos, kaj praktikos

Kiam en suborditaj propozicioj

- 1 Ĉu nia instruisto jam estis ĉi tie, kiam vi alvenis al nia kurso hodiaŭ?
- 2 Kiun vi vidis unue, kiam vi eniris en la lernoĉambron hodiaŭ?
- 3 Kie vi sidis, kiam vi venis al nia kurso la unuan tagon?
- 4 Kun kiu aŭ kun kiuj vi parolis, kiam vi faris la parolekzercon pri "Mia ĉemizo estas...?"

- 5 Kion vi faros, kiam vi hejmeniros post la hodiaŭa leciono?
- 6 Ĉu pluvis, kiam vi vekiĝis ĉi matene?
- 7 Ĉu la suno briladis, kiam vi vekiĝis hodiaŭ?
- 8 Bonvolu diri al mi, kie vi pensas la instruisto estis, kiam vi matenmanĝis ĉi matene.

- 9 Kutime, kien vi iras, kiam vi ferias?
- 10 Al kiu loko vi iris lastjare (en la pasinta jaro), kiam vi feriiis?
- 11 Kiam vi veturas per buso aŭ per trajno, ĉu vi ofte legas ĵurnalon?
- 12 Kio plaĉas al vi fari, kiam vi havas libertempon?

- 13 Kion vi ŝatas fari, kiam vi ne devas fari ion specialan?
- 14 Ĉu vi scias, ĉu Winston Churchill ankoraŭ vivadis, kiam vi naskiĝis?
- 15 Ĉu vi ĉiam aĉetas ion, kiam vi iras al ĉiovendejo, aŭ ĉu vi rezistas al la tento elspezi vian monon?!
- 16 Kiam vi aŭskultas la radion, kiajn muzikojn vi aŭskultas? Rokan, klasikan, ĵazan, blusan, popolan, barokan, punkan, folkan?

- 17 Kiam vi iras rigardi filmon en kinejo, ĉu vi preferas iri sole, kun nur unu alia persono, aŭ kun aro da personoj?
- 18 Kion vi pensas la fremdlandaj turistoj faras, kiam ili iras al Parizo?
- 19 Kaj kion vi pensas la Eŭropanoj faras, kiam ili vizitas Novjorkon aŭ Ĉikagon?
- 20 Ĉu vi rememoras kie vi estis, kiam vi aŭdis pri la internacia lingvo Esperanto la unuan fojon?

- 21 Laŭ vi, kion faris la ebriulo, kiam li eltrinkis la botelon da vino?
- 22 Laŭ vi, kion faris Sinjoro Nopo, kiam li mortigis la kvar muŝojn?
- 23 Viaopinie, kien iris Leopoldo, kiam li finis la ekzercon kun la peziloj?
- 24 Laŭ vi, kion diros nia instruisto, kiam ni finos nian ekzercon pri *kiam*?